


Božena Němcová (1820-1862)

BABIČKA

Kapitola XII (první část)




Byl to zvyk jak ve mlýně, tak v myslivně i na Starém bělidle, že kdokoli přišel na Štědrý den a Boží hod, jíst a pít dostal do sytosti, a kdyby nikdo byl nepřišel, babička byla by šla hledat hosta na rozcestí.

Jakou radost měla ale tenkrát, když znenadání přišel před Štědrým dnem syn Kašpar a bratrův syn z Olešnice. Celého půl dne radostí plakala a přes chvíli od pečení vánoček odběhovala do sednice, kde příchozí mezi dětmi seděli, aby se na syna podívala, aby se bratrovce zeptala, co dělá ten neb ta v Olešnici, a dětem opakovala nejednou: „Jak tuhle vidíte strejčka, tak byl v tváři také váš dědeček, jenže vzrůst po něm nemá.“

Božena Němcová (1820-1862)

AVINETO

Ĉapitro XII (la unu aparto)



Estis kutimo ne nur en la muelejo sed ankaŭ en la arbaristejo kaj en Staré Bělidlo, ke al ĉiu, kiu venis en la domon je kristnaska vespero kaj Festo de Dio, oni donis manĝi kaj trinki ĝis satiĝo; kaj se estus neniu veninta, estus la avineto irinta sur disvojon por serĉi iun gaston.

Sed kian ĝojon ŝi havis, kiam neatendite venis antaŭ la kristnaska vespero ŝia filo Kašpar kaj filo da ŝia frato el Olešnice! Tutan duontagon ŝi ploris pro ĝojo kaj ĉiumomente ŝi forkuradis de la bakado de plektokukoj en la ĉambbron, kie la venintaj sidis inter la infanoj por rigardi la filon, aŭ por demandi la nevon kion faras tiu aŭ alia en Olešnice, kaj al la infanoj ŝi ripetis ne unufoje: estas vera portreto de via avo, nur lian staturon li ne posedas."

Na Štědrý den štědře podělen byl kdekdo, i drůbež a dobytek dostaly vánočky, a po večeři vzala babička ode všeho, co k večeři bylo, po kousku, hodila polovičku do potoka, polovic zahrabala do sadu pod strom, aby voda čistá a zdravá zůstala a země úrodná byla, všechny pak drobtý sesbírājíc hodila „ohni“, aby „neškodil“.

Za chlívem třásla Bětka bezem volājíc: „Třesu, třesu bez, pověz ty mi, pes, kde můj milý dnes;“ a v světnici slívaly děvčata olovo a vosk a děti spouštěly svíčky v ořechových skořepinách na vodu.

Jan tajně postrkoval mísu, v níž voda byla, aby se hnula a skořápky, představujíc loďky života, od kraje ke středu se houpaly; pak volal radostně: „Dívejte se, já se daleko, daleko dostanu do světa!“ -

„Ach milý hochu, až se dostaneš do proudu života, mezi víry a úskaliny, až budou vlny loďkou tvého života smejkat, pak budeš vzpomínat toužebně na tichý přístav, z něhož jsi vyplul,“ řekla si tiše matka, rozkrajujíc jablko chlapcovo „na štěstí“ ve příční polovice.

En kristnaska tago estis ĉiu malavare regalita, ankaŭ la kortbirdaro kaj la bruto ricevis plektokukojn, kaj post la vespermanĝo prenis la avineto de ĉio, kion oni vespermanĝis, po peco duonon de tio ŝi ĵetis en la kanaleton, alian duonon ŝi enterigis en la fruktoĝardeno sub arbon, por ke akvo restu pura kaj sana kaj la tero estu fruktodona, kaj kolektinte ĉiujn panerojn, ŝi jetis ilin en "fajron", por ke ĝi ne "malutilu".

Malantaŭ la stalo skuis Bětka siringon, vokante: "Montriĝu hodiaŭ per hunda ekbojo, al mia amoto, kie la vojo"; kaj en la ĉambro fandis la knabinoj plumbon kaj vakson kaj la infanoj flogigis kandletojn en nuksoŝeloj sur akvo.

Jan sekrete puŝetis la varon kun akvo por ke tiu ĉi moviĝu kaj la ŝeloj reprezentantaj barkojn de vivo balanciĝu de la bordo en la centron; poste li ekvokis ĝoje: "Rigardu kiom malproksimen, kiom malproksimen mi iros en la mondon!"

"Oh, kara knabo, kiam ci estos en fluo de la vivo, inter turniĝoj kaj rifoj, kiam la ondoj agitos la barkon de cia vivo, tiam ci rememoros sopire la trankvilan havenon el kiu ci elflojis," diris por si mallaŭte la patrino, je duonoj distranĉante "la pomon de la feliĉo" de la knabo.

Jádra tvořily hvězdu, tři čisté paprsky, dva pak byly neúplné, od červa sežrané.

Odložíc je s povzdechem stranou, rozkrojila druhé pro Barunku, a vidouc opět hvězdu zatemnělou, povídala si: „Tedy ani jeden, ani druhý nebude úplně šťasten!“. Rozkrojila ještě pro Vilímka i Adélku, a v těch byly zdravé hvězdičky o čtyřech paprscích. „Ty snad,“ myslila matka, a Adélka vytrhla ji z myšlení, stěžujíc si právě, že její lodička nechce plout od kraje a svíčička že už dohořívá.



La grajnoj formis stelon, estis tri sendifektaj radioj, la aliaj du estis nekompletaj, de vermo formorditaj.

Flankenmetinte la pomon kun ekĝemo, ŝi distranĉis alian por Barunka, kaj vidante refoje nekompletan stelon, ŝi diris por si: "Do, nek unu nek la alia estos perfekte feliĉa!" Ŝi distranĉis ankoraŭ pomojn por Vilém kaj Adélka, kaj en tiuj estis nedifektitaj steletoj je kvar radioj. "Eble tiuj ĉi," pensis la patrino kaj Adélka interrompis ŝian meditadon, plendante, ke ŝia barketo ne volas forbordiĝi kaj ke la kandeletoj jam finbrulas.



„Však moje také zhasíná a nepřišla daleko," pravil Vilím. Vtom trkl zase někdo do nádoby voda se rychle rozhoupala a lodičky uprostřed plující se potopily. „Hečte, hečte, vy dříve umřete než my!" zvolala Adélka s Vilímkem.

„Co je víc, jen když jsme byli daleko," odpověděla Barunka a Jan přisvědčil, matka ale smutně dívala se na ta zhaslá světla a předtucha zmocnila se její duše, není-li přece ta nevinná dětská hra věštbou jejich budoucnosti.

"Přinese nám Jezulátko něco?" ptaly se děti babičky potajmo, když se začalo uklízet ze stolu.- „To já nemohu vědět, uslyšíte, jestli zazvoní," řekla babička. Děti menší postavily se k oknu mívíce, že Jezulátko musí jít okolo oken a že je uslyší.

„Což nevíte, že není Jezulátko vidět ani slyšet?" pravila babička. „Jezulátko sedí v nebi na světlém trůnu a posílá dárky hodným dětem po andělích, kteří je přinášejí na zlatých oblacích. Neslyšíte nic než zvonků hraní."

"La mia ankaŭ estingiĝas ja kaj ne malproksimiĝis tre," diris Vilím. En tiu momento refoje iu puŝis la varon, la akvo rapide ondiĝis kaj la barketoj meze flosantaj subakviĝis. "Ha, ha, vi mortos pli frue ol ni," vokis Adélka kun Vilímek.

"Tio faras nenion, ni estis pli malproksime," respondis Barunka kaj Jan afirmis; tamen la patrino malĝoje rigardis la estingiĝintajn kandletojn kaj antaŭsento ekregis ŝian animon ĉu tamen tiu senkulpa infanludo profetas ilian estontecon. -

"Ĉu alportos al ni ion Jesueto?" demandis la infanoj sekrete la avineton, kiam oni komencis forportadi la manĝilaron. "Tion mi ne povas scii; atendu, kiam li sonorigos," diris la avineto. La pli malgrandaj infanoj stariĝis antaŭ la fenestroj, opiniante, ke Jesueto devas preteriri kaj ke ili ekaŭdos lin.

"Ĉu vi ne scias, ke Jesueton oni povas nek vidi nek aŭdi?" diris la avineto. "Jesueto sidas en ĉielo sur hela trono kaj sendas donacetojn por bonaj infanoj pere de anĝeloj, kiuj arportas ilin sur oraj nuboj. Vi aŭdos nenion krom sonoriloj."

Děti se dívaly do oken, nábožně babičku poslouchajíce. Vtom kmitla okolo oken světlá zář a zvenku zazněl hlas zvonku. Děti sepjaly ruce, Adélka pak šeptala tiše: „Babičko, to světlo bylo Jezulátko, vidíte?“ Babička přisvědčila, vtom také matka do dveří vcházela, oznamujíc dětem, že v babiččině světnici Jezulátko jim nadělilo. To byl shon, to bylo radosti, když viděly osvětlený, okrášlený strom a pod ním krásných darů.

Babička sice neznala ten způsob, mezi lidem se to nedělalo, ale líbil se jí; dlouho před vánocemi vždy už sama pamatovala na strom a dceři okrašlovat ho pomohla. „V Nise a v Kladsku panuje vesměs ten způsob; víš-li pak se pamatovat, Kašpare, byl jsi tenkrát, když jsme tam byli, už hodný hoch?“ pravila babička synovi, nechajíc děti těšit se s dary a usednouc vedle něho ke kamnům.

„Jak bych se nepamatoval; hezký to zvyk a dobře, Terezko, děláš, žes ho zavedla; budou to někdy dětem krásné vzpomínky, až se octnou v trudech života. Na ten den si člověk dokonce v cizině nejraději vzpomíná, já to zkusil po kolik let, co jsem ve světě byl.

La infanoj rigardis tra la fenestroj, pie aŭskultante la avineton. En tiu momento ekaperis en mallumo hela lumo kaj ekstere eksonis sonorileto. La infanoj kunmetis la manojn, kaj Adélka flustris mallaŭte: "Avineto, tiu lumo estis Jesueto, ĉu ne vere?" La avineto jesis; en tiu momento enpaŝis ankaŭ la patrino en la pordon, anoncante al la infanoj, ke Jesueto en la ĉambro de la avineto metis por ili donacojn. Kiaj tumulto kaj ĝojo estis, kiam ili vidis iluminatan, ornamitan arbon kaj sub ĝi belajn donacojn!

La avineto ne konis ja tiun ĉi kutimon, kiu ne estis disvastigita inter la popolo, sed ĝi plaĉis al ŝi; longe antaŭ Kristnasko ŝi mem penis pri la arbo kaj helpadis al la filino ĝin ornami. "En Neisse kaj en Kladslo regas tiu ĉi kutimo ĝenerale; ĉu ci memoras, Kaŝpar, ci estis tiam, kiam ni estis tie, jam granda knabo?" diris la avineto al sia filo, lasante la infanojn ĝoji kun siaj donacetoj kaj sidiĝinte apud li al forno.

"Kiel mi ne memorus; tio estas bela kutimo, kaj bone, Terezka, ci faras, ke ci rekondukis ĝin; restos post ĝi belaj rememoroj por la infanoj, kiam ili eksentos malfacilaĵojn de la vivo. Je tiu tago oni plej ofte rememoras en fremdlando, mi spertis tion dum ĉiuj jaroj, kiujn mi pasigis en fremdlando.

Dost dobře jsem se mnohdy měl u mistra, ale vždy jsem si myslel: Kým bych seděl raději u matky a měl kaši s medem, buchtičky s makovou odvárkou a hrách se zelím, všechna ta dobrá jídla bych vám za to dal." - „Naše jídla," usmála se babička a přikývla hlavou;" ale ještě jsi zapomněl sušenou míchaninu (ovoce)."

„To víte, o to jsem nehrubě dbal; v Dobrušce říkají tomu muzika. Na něco jiného jsem ale vzpomínával, co jsme všichni rádi poslouchávali." - „Však já vím, co myslíš: pastýřskou koledu, to je zde také, počkej, uslyšíš to zanedlouho," pravila babička, a sotva to dořekla, ozvala se zvenčí u okna pastýřská trouba.

Nejdřív odtroubil melodii pastýřské písně kolední, pak začal zpívat Vzhůru vstaňte, pastýřkové, hlasná novina, Spasitel se nám narodil v Betlémě v chlévě" atd. - "Máš pravdu, Kašpare, kdybych neslyšela tu píseň, ani by mi Boží hod nepřicházel tak veselý," pravila babička, poslouchajíc s potěšením. Pak ale šla ven a naložila pastýřovi do mošny výsluhu.

Sufiĉe bone mi fartis ĉe la majstro, tamen ĉiam mi pensis: "Prefere mi sidus ĉe la patrino kaj manĝus kaĉon kun mielo, kukojn kun papavo kaj piron kun brasiko, ĉiujn bonajn manĝaĵojn ĉi tie mi donus por tio!" - "Niaj manĝaĵoj," ekridetis la avineto kaj jesis per la kapo; "sed ankoraŭ ci forĝesis pri sekaj fruktoj."

"Vi scias ja, ke mi ne tro ŝatis tion ĉi; en Dobruška oni nomas tion muziko. Sed je io alia mi rememorado, kion ni ĉiuj plezure aŭskultadis." "Mi scias ja, kion ci pensas: kanton de paŝtistoj; tio estas ankaŭ ĉi tie, atendu; post nelonge ci ankaŭ ekaŭdos ĝin, diris la avineto, kaj apenaŭ ŝi finparolis, aŭdiĝis de ekstere paŝtista trumpeto.

Plej unue li trumpetis melodion de la paŝtista kanto, poste li komencis kanti: Supren, leviĝu, paŝtistoj, aŭskultu novaĵon, la Savonto naskiĝis en Betlemo en stalo," kaj tiel plu. - "Ci estas prava, Kaŝpar, se mi ne aŭdus tiun kanton, la Kristvespero ne ŝajnus al mi tiom gaja," diris la avineto aŭskultante kun plezuro. Poste ŝi eliris eksteren kaj pridonacis la paŝtistojn malavare.

Na Štěpána šli chlapci na koledu do mlýna a do myslivny; kdyby nebyli přišli, paní máma byla by myslila, že na ně strop spadl, a sama by byla na Staré bělidlo přiběhla. Bertík a Frantík zase navzájem dolů přišli koledovat.

Uběhly vánoční hody; děti povídaly si už zase, že přijdou Tři krále a pan učitel že přijde psát tři krále na dvěře a koledovat, a po Třech králích slavily přástevnice teprv „dlouhou noc“.

Ovšem na Starém bělidle a ve mlýně nebylo to jako ve vsi, kde bylo mnoho chasy; tam si volili královnu a krále, byla muzika, strojila se přeslice a vrkoč se dával. Na Starém bělidle vystrojila se dobrá večere, přástevnice sešly se, zpívalo se, jedlo, pilo, a když tu najednou za dveřmi ozval se flašinetl, začalo se v kuchyni tančit.

Přišel také Tomeš, pan otec i myslivec, přišli ještě někteří a taneček byl spořádán. Kuchyň byla ovšem cihlami vyložena, ale děvčata si z toho nic nedělaly, a kterým líto bylo střevíců, tancovaly bosy.

No jakpak, babičko, mohli bychom spolu trochu faldy provětrat?" šklíbil se pan otec, přijda ze

En tago de sankta Stefano iris la knaboj kanti en la muelejon kaj en la arbaristejon; se ili ne estus venintaj, pensus la sinjorino patrino, ke plafono estis falinta sur ilin kaj ŝi mem estus alkurinta en Staré Bělidlo. Bertík kaj Frantík venis reciproke kanti malsupren.

Kristnaskaj tagoj pasis; la infanoj interparolis jam, ke venos tri reĝoj, kaj ke la sinjoro instruisto venos skribi K M B sur pordojn kaj kanti, kaj nur post festo de tri reĝoj solenis la ŝpinistinoj "longan nokton".

En Staré Bělidlo kaj en la muelejo tio ne estis tia, kiel en la vilaĝo, kie estis multe da gejunularo; tie oni elektis reĝinon kaj reĝon, estis muziko, oni ornamis ŝpinspindelon kaj donis harligaĵon. En Staré Bělidlo oni aranĝis bonan vespermanĝon, la ŝpinistinoj kunvenis, oni kantis, manĝis kaj trinkis kaj kiam subite eksonis malantaŭ pordo gurdo, oni komencis danci en la kuirejo.

Venis ankaŭ Tomeš, sinjoro patro kaj la arbaristo, venis ankoraŭ aliaj kaj malgranda balo estis improvizita. La kuirejo estis ja pavimita nur per brikoj sed tio neniel ĝenis la knabinojn, kaj kiuj domaĝis la ŝuojn, tiuj dancis nudpiede.

"Nu, avineto, ni povus ankaŭ kune iom aerumi la faldojn, ĉu ne?" rikanis la sinjoro patro veninte el la

sednice, kde staří seděli, do kuchyně mezi tancující, kdež i babička byla, neboť musela dohlížet na tu malou drůbež, která se pletla vprostřed kole spolu se Sultánem a Tyrlem.



"I milý pane otče, bývaly časy, kde jsem nedbala, třebas plné nohy krvavých mozolů byly, jen když jsem tančila. Jak jsem se v hospodě nebo v létě na mlátě ukázala, už křičeli hoši: Madlena je tu, hrajte kalamajku, vrtáka! Hajdy, Madla letěla do kola. Ale teď, ty můj milý bože, jsem jako pára nad hrcem."

ĉambro, kie sidis la maljunaj, en la kuirejo inter la dancantojn, kie ankaŭ estis la avineto, ĉar ŝi devis inspekti la geetularon, kiu meze de la rondo balanciĝis kune kun Sultán kaj Tyril.



"Oh, kara sinjoro patro, estis tempoj, kiam mi ne zorgis pri tio, ke mi havas piedojn plenaj de sangaj kaloj, nur se mi dancis. Apenaŭ mi montriĝis en gastejo aŭ somere en draŝejo, jam kriis knaboj: Madlena estas ĉi tie, ludn "kalamajka", "vrták"!*) Kaj Madla turniĝadis jam." Sed nun, ho mia bona Dio, mi estas kiel vaporo super poto."

„Což je o to, vy jste ještě jako křepelka, babičko, mohli bychom přece zkusit taneček," mýnil pan otec, zatoče pikslu mezi prsty. - „Tuhle je tanečnice, pane otče, ta zná se točit jak vřeteno," smála se babička, berouc za ruku mladou Tomšovou, kteráž právě stála za panem otcem a rozmluvu jejich poslouchala.

Vesele vzala mladá žena pana otce za ruku, Kudrnovi řekla, aby zahrál tu první zvolna. Kudrna drže v jedné ruce kus jahelníka, z něhož pro ukřácení chvíle jedl, spustil sousedskou, a pan otec musel chtěj nechtěj do kola a chasa pustila se do tleskání, až panímámy vyšly ze sednice podívat se, co se to bylo přihodilo.

Když tam byly, vzal Tomeš paní mlynářku k tanci, pan otec roztancován provedl hospodyni a tak si chvíli i ti staří proskočili, babička pak se panu otci smála.

A sotva bylo po „dlouhé noci", již byly zase hody ve mlýně, zabíjeli prase, smažili šišky, při čemž museli být přátelé ze Starého bělidla a pan myslivec; pan otec poslal pro ně sáně. Později byla ta sláva v myslivně a nejposledněji u Prošků.

"Ho, vi estas ankoraŭ kiel koturno, avineto, ni tamen povus provi ekdanci," opiniis la sinjoro patro, turninte la flartabakujon inter la fingroj. - "Jen estas dancantino, sinjoro patro, tiu scias turniĝadi kiel spindelo," ridis la avineto prenante je la mano la junan edzinon de Tomeš, kiu staris malantaŭ la sinjoro patro kaj aŭskultis ilian dialogon.

Gaje prenis la juna virino la sinjoron patron je la mano, al Kudrna ŝi diris, ke li ludu la unuan malrapide. Kudrna, tenante en unu mano pecon da miliaĵo, kiun li de tempo al tempo formanĝadis, ekludis malrapidan nacian valson "*sousedská*", kaj la sinjoro patro devis vole nevole danci. La gejunularo komencis aplaŭdi tiom, ke la sinjorinoj eliris el la ĉambro por rigardi, kio estis okazinta.

Kiam ili estis tie, prenis Tomeš al danco la sinjorinon muelistedzinon, la sinjoro patro estante "en fajron" dancis ankoraŭ kun la domestrino kaj tiel ankaŭ la maljunaj pasigis per dancado iom da tempo kaj la avineto ridis poste la sinjoron patron.

Kaj apenaŭ estis pasinta la "longa nokto", estis refoje festeno en la muelejo, oni buĉis porkon, fritis bulkojn, ĉe ĉio devis esti la amikoj el Staré Bělídlo kaj la sinjoro arbaristo; la sinjoro patro venigis ilin per glitveturilo. Tiu ĉi festo ripetiĝis poste en la arbaristejo kaj fine ankaŭ ĉe Prošek,

A tu zase přišli jednoho dne s Dorotou. Králem Diokleciánem byl Kudrnův Václav, Dorota panna byla jeho sestra Lída, dva dvořenínové, soudce, kat a jeho holomci byli chlapci, snad ze Žernova. Holomci a dvořenínové nesli mošinky na dary.

Před Proškovíc byla dlouhá sklouzačka, tam se obyčejně páni herci zastavili a trochu se klouzali; Dorota panna se na ně dívala zkroušeně, zimou se třesouc. Pobízela je sice, aby šli, ale její hlas proti tolikerým hlasům nevystačil, a musela mnohdy být svědkyní jejich hurování se, jestli jeden druhého při klouzání strčil.

Konečně vešli do stavení, kde je psi s náramným štěkotem vítali, děti ale s radostí. U kamen si spravovali šat a složili mošny. Byl to jednoduchý oblek; Dorota panna měla bratrovy boty, přes svoje sukně bílé kamrtuchové šaty vypůjčené od Mančinky, na krku korále, místo roušky máminu bílou plachetku a na ní papírovou korunku.

Chlapci měli přes oblek bílé košile, okolo pasů strakaté šátky, papírové čepice. Dioklecián měl také korunu a měl plášť přes ramena viset, máminu

kie oni ludis unu tagon Sanktan Doroteon. Reĝo Diokleciano estis Václav Kudrna, virgulino Doroteo estis lia fratino Lída, du korteganoj, juĝisto, ekzekutisto kaj ties du helpantoj estis knaboj verŝajne el Žernov. La helpantoj kaj la korteganoj portis saketojn por donacoj.

Antaŭ la domo de Prošek estis longa glitvojo, tie kutime haltis la sinjoroj aktoroj por iom amuziĝi per glitado; la virgulino Doroteo rigardis ilin triste, tremante pro malvarmo. Ŝi admonis ilin kvankam ke ili jam iru, tamen ŝia voĉo kontraŭ tiom da aliaj estis malforta kaj ŝi devis multfoje ankoraŭ esti atestantino de ilia batalo per neĝbuloj, se iu puŝis alian ĉe la glitado.

Fine ili enpaŝis en la domon, kie akceptis ilin hundoj kun grandega bojado kaj la infanoj kun ĝojo. Apud la forno ili reordigis siajn vestojn kaj formetis la saketojn. Iliak kostumoj estis tre simplaj; la virgulino Doroteo havis botojn de sia frato, sur siaj vestoj blankan robon el maldika tolo, prunteprenitan de Mančinka, ĉirkaŭ la kolo koralojn, anstataŭ vualo blankan ŝultrotukon de sia patrino kaj sur ĝi kroneton el papero.

La knaboj havis sur siaj vestoj blankajn ĉemizojn, ĉirkaŭ la talio diverskolorajn tukojn kaj paperajn ĉapojn. Diokleciano havis ankaŭ kronon kaj

květovanou nedělní zástěru, kterou mu ze zvláštní ochoty zapůjčila.

Když se trochu ohřáli, postavili se doprostřed sednice a začali svůj kus provozovat; děti ho sice slyšely každický rok, ale vždy se jim velice líbil.

Když pak král Dioklecián pohan Dorotu pannu křesťanku odsoudí, aby umřela rukou katovskou, vezmou ji holomci pod paždí a vedou ji na popraviště, kde na ni kat s napřáženým mečem čeká a s hrozným patosem zvolá: „Doroto panno, klekej, nic se mého meče nelekej, skloň jen hlavu hrdinsky, setnu já ti ji mistrovsky!”

Dorota panna klekne, skloní hlavu a kat setne jí korunku z hlavy, již holomci zdvihnou. Pak se všickni pokloní, Dorota panna dá si korunu zase na hlavu a postaví se ke dveřím do kouta. „Vidíme, jak to ty děti hezky umějí, až milo poslouchat,” povídá Vorša.

Babička je také velice pochválí a hojně obdarování vyhrnou se herci ze dveří. Za stavením prohlídnou si, co dostali; potravu král rozdělí hned, ale peníze strčí do své kapsy,

de liaj ŝultroj pendis mantelo, florkolora antaŭtuko, kiun dimanĉe portis la patrino, kiun tiu ĉi kun speciala komplezo pruntis al li.

Iom varmiĝinte ili stariĝis meze de la ĉambro kaj komencis prezenti sian spektaklon; la infanoj aŭdis tion ĉiujare sed ĉiam ĝi tre plaĉis al ili.

Kiam poste la reĝo Diokleciano, idolano, kondamnas virgulinon Doroteon, kristaninon, ke ŝi mortu per mano de ekzekutisto, prenas ŝin la helpantoj de tiu ĉi sub la brakoj kaj kondukas ŝin sur eŝafodon, kie atendas ŝin la ekzekutisto kun levita glavo kaj ekvokas kun terura patoso: "Virgulino Doroteo genuiĝu, mian glavon ne timiĝu, mallevu fiere la kapon, mi faros majstrecan hakon!"

La virgulino Doroteo genuiĝas, mallevas la kapon kaj la ekzekutisto forhakas ŝian kronon de la kapo, kiun la helpantoj relevas. Poste ĉiuj kliniĝas, la virgulino Doroteo refoje metas la kronon sur sian kapon kaj stariĝas en angulon al la pordo. "Rigardu, kiel la infanoj scias tion bele ludi, estas ĝojo aŭskulti," parolas Vorša.

La avineto ankaŭ tre laŭdas ilin kaj la infanoj ŝarĝitaj per multaj donacoj eliras el la pordo. Malantaŭ la domo ili ekzamenas kion ili estis ricevintaj; la nutraĵon distribuas la reĝo tuj, sed monon li ŝovas en sian poŝon,

poněvadž on co ředitel celé výpravy jediné právo k tomu měl a také výlohy a odpovědnost na sobě jediné nesl.

Po takovémto spravedlivém rozdělení pustili se herci k Rýznburku. Proškovic děti průpovědi opakovaly si po kolik dní z těch deklamací a provozovaly Dorotu. Jediná matka nemůže pochopit, jak se komu taková hloupost líbit může.

A tu už zase byly „ostatky“ a v neděli přijely z města pěkné sáně, na koních rolničky, které na dvorku tak silně zazvonily, kdykoli sebou koně pohnuli, že vrána, zimní to navštěvovatelka Proškovic záspí, rychle uletěla na jeřáb, a kury i vrabci s velikým podivením na spřežení se dívali, myslíce si asi: Pro pána krále, copak to má být!

Přijeli pro rodinu Proškovic, aby jeli na masopust ke kmotrovi Stanickému do městečka. Babička ale nikdy nechtěla jeti, říkala: „Co tam, nechte mne doma, já se mezi panstvo nehodím.“ Stanických byli hodní, vlídní lidé, ale že tam byl hostinec,

čar li sola kiel direktoro de la tuta entrepreno rajtis tion kaj čar li ankaŭ elspezojn kaj respondecon portis.

Post tia laŭrajta distribuo marŝis la infanoj al Riesenburk. La infanoj de Prošek dum kelke da tagoj ripetadis fragmentojn el la deklamaĵoj kaj ludis Doroteon. Sole la patrino ne povas kompreni, ke tia sensencaĵo povas al iu plaĉi.

Kaj jen estis jam karnavalo ĉi tie, kaj dimanĉe alvenis el la urbo bela glitveturilo. Ĉevaloj havis sonoriletojn, kiuj en la korto tiom forte eksonis, kiam ajn la ĉevaloj ekmoviĝis, ke korniko, la vintra vizitanto de la sojlo, rapide forflugis sur la sorparbon kaj la kokinoj kun paseroj kun granda miro rigardis la ĉevalojn, pensante verŝajne: Sinjoro mia reĝo, kion ĝi signifas!

Oni alvenis por inviti la familion de Prošek, ke ĝi solenu la finon de la karnavalo ĉe la baptopatro Stanický en la urbeto. La avineto tamen neniam konsentis iri; ŝi diradis: "Kion tie? Lasu min hejme, mi ne konvenas inter urbanojn." Ambaŭ Stanický estis bonaj kaj amikaj homoj; sed čar ili posedis gastejon,

přišlo rozličných hostů, i na kolik mil, a to nebyla společnost pro skromnou babičku.

Když večer přijely domů, vypravovaly děti babičce, co měly dobrého, přinesly jí výsluhu, chválily hlučnou muziku, kterou slyšely, a povídaly, kdo tam všecko byl. „A hádejte, koho jsme tam ještě viděli?“ pravil Jan. - „Nu, kohopak?“ babička na to. „Kupce Vlacha, co k nám jezdí a co nám dává vždy fíky. Ale vy byste ho nepoznala, nebyl tak špinavý, jako když k nám přijede; ustrojen byl jako kníže pán a měl zlatý řetěz u hodinek.“

„Čeho dost, snadno tím plýtvati,“ řekla babička; „ostatně,“ doložila, „vy také nejdete mezi lidi v šatech, v nichž se doma válíte, to je dlužen člověk společnosti i sobě chodit si v čistém šatu, když to může být.“

„Ale ten musí být bohatý, vidíte?“ mínily děti. - „Nevím, nebyla jsem v jeho truhle, ale může být, umí on dobře prodávat.“

alvenis diversaj gastoj ankaŭ de malproksimo de kelke da mejloj kaj tio ne estis societo por la modesta avineto.

Kiam vespere alveturis la infanoj hejmen, ili rakontis al la avineto, kion bonan ili havis, ili alportis al ŝi pecojn da manĝaĵoj, laŭdis la bruon muzikon kaj rakontis kiu estis tie. "Kaj divenu, kiun mi ankoraŭ vidis tie," diris Jan. "Nu, kiun do?" demandis la avineto. "La komerciston Vlach, kiu al ni alveturadas kaj donas al ni ĉiam figojn. Sed vi ne estus lin rekoninta, li ne estis tiom malpura kiel kiam li alveturas al ni; li estis vestita kiel la sinjoro princo kaj li havis orĉenon ĉe horloĝo."

"Se oni havas da io sufiĉe, oni povas malŝpari," diris la avineto, "cetere," ŝi aldonis, "vi ankaŭ ne iras inter la homojn en la vestoj, en kiuj vi hejme ruliĝas, tion oni ŝuldas al la societo kaj al si mem, iri en pura vesto, se tio povas esti."

"Sed li devas esti riĉa, ĉu ne vere?" opiniis la infanoj. "Mi ne scias, mi ne vizitis lian ŝrankon, sed li povas esti, li scias bone vendadi."

Poslední den masopustu přišly ještě s velikým povykem maškary, v čele sám masopust; byl celý ověšen hrachovinou jako medvěd. V každém stavení utrhly z něho hospodyně kousek a schovaly. Ten kousek hrachoviny z masopustu dávaly husám do hnízd, když je nasazovaly, aby prý dobře seděly.

Pochoval se masopust a s ním konec učiněn zimním radovánkám.

La lastan tagon de la karnavalo venis ankoraŭ kun granda krio maskitaro, fronte troviĝis mem Karnavalo; li estis tute ĉirkaŭvolvita per piztrunkoj kiel urso. En ĉiu domo forŝiris la mastrinoj pecon de ĝi kaj kaŝis ĝin. Tiun pecon da piztrunkoj ili donis en la nestojn de la kovontaj anseroj, por ke ili bone kovu.

La karnavalo estis metita en tombon, kaj kun ĝi finiĝis la vintraj amuzoj.

*esperantigis Vl. Tobek kaj K. Procházka
(aperadis serie en "Časopis českých esperantistů
- la Gazeto de ĉeĥaj esperantistoj - en 1914)*

*ciferecigis Miroslav Malovec,
ilustraĵojn skanis Jan Pospíšil
kontrollegis kaj spegulforme aranĝis Paola Dvořáková*